

n-ro 51

januaro 1996

Lastminute

Dum la lastaj ŝtatestraj decidoj pri Eŭropa Mona Unuiĝo (EMU) estas tute aktualaj kaj antaŭ ol tiurilataj tekstoj komencas aperi en la esperanta gazetararo, mi volas pledi por konsekvenca uzado en Esperanto de la formo "eŭroo" kiam temas pri la planata unueca valuto. Ŝajnas al mi, ke tiu estas la sola lingve kohera formo, kiu respektas la radikecon de la alprenita nomo nacilingva "Euro" (diverslande diverse prononcota !) kaj donas kontentigajn derivaĵojn - ekz. eŭroa konto, eŭroa kurzo, pagi eŭro. Tio ankaŭ konsekvenca kun la jama ekzisto de "eŭro-" kiel kvazaŭprefikso. Necesas, ke la uzantoj de Esperanto kutimiĝu uzi bone esperantigitan vorton tie ĉi kaj ne diversajn kriplajn formojn tro influatajn de la nacilingvaj prononcoj kaj strukturoj: la nomo de la onta monunuvo ne povas esti simple "eŭro" kun radiko "eŭr-".

Brian MOON

Enhavo

Salutvortoj de la prezidanto	3
Unuiĝintaj Nacioj - Elektronika konosamento	4
La formulo por ekonomia evoluo - 20jara sperto en Azio	5
Toponimia terminaro - Radio Havano - Pekoteko	6
Historio de la komercaj ĉambroj en Belgio	7
Traktato EU - ITRE - Reviizado PIV	8
Komercaj petoj kaj proponoj	9
Nova aliĝo	10

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas jara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu !

Parto de *La Merkato* estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

La jara membreca kotizo estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikf-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonnumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT.

Perantoj:

Cinio: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro **YAMASAKI** Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto study069(a)jpdokyo.dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

Salutvortoj de la prezidanto

Estimataj gekolegoj, karaj IKEF-anoj !

La jubilea jaro 1995 estas malantaŭ ni, IKEF troviĝas en sia dekunua jaro de ekzistado. La UEA-organo "Esperanto" de decembro 1995 aperigis en la rubriko "fakaj asocioj" sub la titolo "Kiu plej praktike uzas Esperanton" tutpaĝan raporton pri nia fakgrupo. UEA alte taksas la agadojn de fakaj asocioj por la disvastigo de la lingvo kaj deziras havi daŭrajn raportojn pri ilia farado. Mi promesis al la redaktoro liveri tiajn informojn, utilajn por UEA kaj por IKEF.

Mi varme rekomendas al vi, ke vi legu tiun artikolon (ĝi estas kopiita je p. 12), kvankam la plej multo ja estas konata al vi. Tamen ŝajnas al mi necese, ke ni ne sufiĉe ofte povas enkapigi al ni la plej gravajn kaj ŝancoplenajn agadojn, kompreneble kun la celo, ke ni agadu tiudirekte. Al tio mi volas inviti vin ankaŭ dum 1996. Ne perdu vian entuziasmon, se tia aŭ jena afero ne sukcese realiĝas. Post malsukcesoj certe sekvos per diligento, senlacigo kaj konvinkoforto novaj sukcesoj. Pri tiuj ni ĉiuj ĝojos.

Mi deziras al vi bonan jaron 1996, plena de suno, feliĉo kaj prospero por vi kaj viaj familianoj, sed ankaŭ riĉa pri ĝojiĝaj sukcesoj en via agado por IKEF kaj Esperanto.

Franz Josef BRAUN

Entrepenistoj, firmao-gvidantoj!

Estas klare, ke ĉiu soci-grupo havas sian intereso-sferon. Estus tre utile kunigi ankaŭ la esperantistajn entrepenistojn (kiuj mem havas propran firmaon aŭ gvidas ne-esperantistan entrepenon) por - krom pritrakti la komunajn temojn, interesojn - almenaŭ ekkoni unu la alian.

Ni planas kompili tiun liston, eble poste formi iun neformalan, eventualan "klubon". Se vi mem apartenas al tiu grupo, estas bonvena via komenca mallonga sinprezento kun viaj datumoj. La listo estos nepublika, ĝi servos nur tiujn, kiuj enestos en la listo.

Viajn leterojn direktu aŭ al la kompilanto (Oszkar Princz, Peranto Bt, Tatra u. 4, H-1136 Budapest, Hungario), aŭ rekte al la redakcio de la revuo Eventoj, LINGVO-Studio, pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario (retpoŝto eventoj(a)odin.net).

Esperanto-Medaloj 1912-1995

En novembro 1995 s-ro Hans JANKOWSKI (Am Wemphof 5, D-44379 DORTMUND) eldonis 32-paĝan libreton en kiu li priskribas la Esperanto-medalojn ĝis nun konatajn de li: 83 diversajn el 24 ŝtatoj. Certe ankoraŭ ekzistas aliaj, kaj informoj (se eble kun foto aŭ skizo) estas bonvenaj ĉe la

aŭtoro. La prezo de la libreto ne estas indikita.

RR

Unuiĝintaj Nacioj: Ŝuldato

La 25an de majo 1995 en usona San Francisco okazis akcepto por rememori la 50-jaran datrevenon de la formala subskribiĝo la la UN-Ĉarto. S-ro Butros-Gali, Ĝenerala sekretario de UN, diris ke, se UN ne povas ricevi finanĉan subtenon de siaj membrolandoj, ĝi tre malfacile povos realigi siajn diversajn celojn. Membrolandoj nun Ŝuldas al UN entute sumon de pli ol 2 miliardoj da usonaj dolaroj. Plej grandaj Ŝuldantoj estas Usono (1,8 miliardoj da dolaroj) kaj Rusio.

Mu Binghua

Elektronika konosamento (bill of lading, B/L)

Ordonkonosamento (B/L to order) estas negocebla, t.e. facile transdonebla. Pro tio pluraj projektoj por transformi ĝin en elektronikan formularon malsukcesis, i.a. pro manko de sekureco. Sub instigo de la Eŭropa Komisiono pluraj internaciaj transport- kaj komunikad-kompanioj grupiĝis en projekto BOLERO. Sekve de tio je la 30a de junio 1995 la unua elektronika konosamento estis "transdonita" de ŝipkompanio Nedlloyd Lines.

Informoj pri la projekto haveblas ĉe s-ro David Herson (fakso +322-296-6271, CompuServe 100137,1072, Internet dhe(a)postman.dgl3.cec.be).

(el I&T Magazine de EU, julio 1995)

Vinilkosmo

Antaŭ nelonge aperis la nova kasedo- kaj disko-katalogo de Vinil-kosmo. Adreso: F-31450 DONNENVILLE, Francio, telefono/fakso +33-61.81.95.65. Samadrese troviĝas Eurokka (Esperanto-Rok-Asocio), eldonanto de la Esperanto-Muzik-Magazino Rok-gazet' (abono por 4 numeroj: 35 NLG al UEA-konto rokk-b).

LA TREZORO - Vortaro de arabaj kaj islamaj proverboj

Ĉi tiu verko prezentas pli ol 6000 proverbojn, maksimumajn kaj anekdotojn el diversaj epokoj de la vasta araba kaj islama mondo. La eroj estas alfabete aranĝitaj laŭ temoj (423 rubrikoj). Formato A4, 170 p., komputile kompostita. Prezo: 30 GBP por sendo en Eŭropo, plus 8 GBP por aera sendo ekster Eŭropo. Eldonanto: Hussain M. Al-Amily, 134 Brent Road, Southall (Gr. London), UB2 5LD, Britio; telefono/fakso 0181-893.5960. Ankaŭ ekzistas angla kaj araba versioj.

RR

Dua Nacia Kongreso de Kuba E-Asocio

okazos je 7-9 marto 1996 en Havano. Programo kaj informoj pri loĝado

(ankaŭ postkongresa) haveblas ĉe la kongresa preparkomitato: Kuba E-Asocio, pf. 5120, CP 10500 LA HAVANA; telefono 401364 kaj 404484, fakso (537) 338729.

La formulo por ekonomia evoluo: 20-jara sperto en Azio

(resumo de la prelego de Prof. LEE Chong-Yeong dum 80a UK en Tampere)

Oni aŭdas multe pri ekonomia miraklo de Azio, sed esplorinte la azian sperton dum la pasintaj 20 jaroj (1974-94), ni trovis ke estis ne miraklo. La "sekreta" recepto de sukcesa ekonomio estis: diligenta laboro + malalta imposto + alta ŝparo + minimuma regado.

Diligenta laborado

Azianoj laboras pli multajn horojn kun malpli da pagitaj ripoztagoj ol eŭropanoj. En 1993 azianoj laboris ĉ. 2 200 horojn, kun iomete pli ol 10 pagitaj feriotagoj; eŭropanoj laboris ĉ. 1 700 horojn, kun ĉ. 30 pagitaj feriotagoj.

Malalta imposto

Kiam homoj, ankaŭ azianoj, gajnas monon, ili ŝatas havi ĝin por si mem kaj ne ŝatas pagi ĝin al la registaro kiel imposton. La impostprocento de aziaj landoj estas ĝenerale malpli alta ol tiu de evoluintaj okcidentaj landoj. Ekzemple Japanio havas tre altan maksimuman impostprocenton (65%), sed ĝi aplikiĝas nur por tiuj kiuj enspezas pli ol 206 000 USD jare. Sed en Francio, tiuj kiuj enspezas 54 000 USD aŭ pli jam devas pagi laŭ la maksimuma procento, 57%.

Alta ŝparo

Ekonomia ŝparprocento (% de ŝparo el la malneta enlanda produkto - GDP) indikas eblecon por investo. Stimulite de malalta impostprocento, la enlanda ŝparprocento de aziaj landoj estas treege alta kaj multe kontribuas al la ekonomia prospero. Ŝajnas ke ĉefa kaŭzo de la altaj ŝparprocentoj estas la interezprocento (pli alta ol la inflacio) en la nove industriigitaj landoj.

Minimuma regado

Multaj registaroj de afrikaj landoj gvidis ekonomion pere de ŝtatigo de preskaŭ ĉiuj industrioj; multaj okcidentaj landoj gvidis ĝin pere de burokrata regado. Sed sub libera merkata ekonomia sistemo, entreprenistoj bezonas pli politikan kaj ekonomian stabilecon ol gvidon de registaro. Multaj aziaj registaroj agis ĝuste tiel. Ili firme tenis stabilan kaj antaŭvideblan ekonomian medion, eĉ tiam kiam ili suferis de politika renverso. Ili ne multe intervenis en la libera fluo de la libermerkata forto, sed jes aktive stimulis kaj helpis eksporton. Ĝenerale, la ĉefa kontribuo de la registaroj de la aziaj evoluantaj landoj estis kreado de moderna infrastrukturo.

Ekonomia prospero

Nun Azio havas trionon de la tuta landa areo kaj duonon de la tuta loĝantaro de la mondo. Azio okupas 25% de la tutmonda eksporto kaj 23% de la

tutmonda importato. En kelkaj aziaj landoj vivdaŭro estas je okcidenta nivelo, fakte japanoj kaj hongkonganoj jam vivas pli longe.

(resumis rr)

Toponimia terminaro

(el TERMINOTEKO, 95.10.25)

Istlia Eldonejo Esperantista (Lorenc' Mee, 91 Whitebeck Court, Moorway Drive, Manchester M8 2HR, Britio, rete: lorensmi(a)gn.apc.org) antaŭ nelonge aperigis trian eldonon de la "Toponimia Terminaro". Enestas pli ol naŭcent kapvortoj (toponimoj, regnonimoj, landano-nomoj) analizitaj laŭ diversaj kriterioj (ekzemple membreco de UNO, IMF...). Ĉar la terminaro troviĝas sur disketo, la terminoj estas serĉeblaj laŭ metodo simila al tekstprilaborilo. Bezonata estas IBM-kongrua komputilo kun minimume 400 KB da interna memoro, prefere kun kolora ekrano.

La terminaro estos precipe diskutilo por terminologoj, kiuj trovas en ĝi fundamentajn, akademiajn kaj aliajn versiojn de la diversaj nomoj. Por landnomoj kaj nomoj de gravaj urboj estas interese per ĝi serĉi la eblajn variantojn. Mi tamen demandas min ĉu indas klopodi traduki ĉiujn nomojn de urboj, regionoj, riveroj... ? Al kiu utilas la mencio: "Rodainsulo: unu el la usonaj ŝtatoj" ? Persona opinio estas ke en tia kazo estas preferinde uzi la originalan formon, sed mi ja ne estas terminologo...

La terminaro kostas 7,50 GBP, inkluzive de sendkosto (se eble plus transpagaj kostoj).

RR

Radio Havano Kubo

Radio Havano elsendas al Eŭropo je 19.30 kaj 22.00 UTC (25 m, 11705 khz), al Ameriko kaj Karibio je 15.00 UTC (25 m, 11760 khz) kaj je 23.30 UTC (25 m, 11760 khz; 31 m, 9550 khz; 49 m, 6195 khz), kaj al okcidenta-norda Amerika kaj pacifika Azio je 7.00 UTC (49 m, 6195 khz).

Lourdes LOPEZ

Pekoteko (Perkomputora Termina-Kolekto)


La kompleta kolekto estas havebla sur disketo, legebla per IBM-kongrua komputoro. Kelkaj terminoj estas tiel modernaj, ke eĉ en etno-lingvaj enciklopedioj oni ne ankoraŭ trovas informojn pri ili, ekzemple pri "karaoko", kvankam preskaŭ ĉiu junulo en multaj landoj scias, pri kiu temas. Kiel ĉiam en la kadro de "lingvo-observanto" traduk-proponoj, kritikoj kaj aldonoj estas bonvenaj.

Ankaŭ in 1995 ni daŭrigas nian kolekton de aktualaj vortoj laŭ la nun jam bone establita metodo. Ĉiuj interesatoj estas invitataj kunhelpi pri la kompletigo de aktuala internacia vortaro de Esperanto. Ĉar la plimulto de la ĝisnunaj kontribuantoj denaske parolas la germanan aŭ anglan, ni pricipie ĝojus pri kapablaj kunlaborantoj kun aliaj gepatraj lingvoj. Kontaktadreso: Bernhard PABST, Südweg 42, D-53773 HENNEF.

Historio de la komercaj Ĉambroj en Belgio

(laŭ letero de Tangshan-a E-Asocio)

Samtempe kun ekspozicio pri la historio de la komercaj Ĉambroj en la "Sudaj Nederlandoj" (pli malpli la nuna Belgio), la belgaj ŝtataj arĥivoj aperigis studon pri la historio de tiuj Ĉambroj de la 17a ĝis la 20a jarcento. Kvankam ĝi kompreneble unualoke pritraktas la belgan situacion, ĝi ankaŭ donas interesajn informojn pri similaj instancoj en aliaj okcidenteŭropaj landoj, ekzemple pri la ekesto de ilia privata aŭ publika statuso. El la libro mi transprenis jenan organigramon:



Teknikaj informoj de la studo: formato A4, il., 128 p. Ref. D/1995/0531/029, publ. 2200. Ekzistas franclingva kaj nederlandlingva versioj. Prezo: 775 BEF (+ afranko: 100 BEF enlande, 150 BEF eksterlande) al pĉk. 000-2007805-02 de Algemeen Rijksarchief, Ruisbroekstraat 8, B-1000 Bruselo.

RR

Zamenhof-monumento en Ĉinio planita

Je la 15a de decembro estos la 140a datreveno de la naskiĝo de doktoro Zamenhof. Tangshan-a E-Asocio (P.O. Box 3, CN-063000 Tangshan, He Bei, Ĉinio) planas je tiu okazo gravuri statuon (80 oble 20 m) sur roko de monto Dacheng. Por tiu grandega laboro - kiun oni komencu en 1996 - la grupo petas monhelpojn de esperantistoj. Pagojn ĝis 100 USD eblas sendi per registrita letero; pli altajn per bankĉeko.

Traktato pri la Eŭropa Unio

En LM48 estis anoncita la E-traduko de la t.n. "Traktato de Maas-tricht". Oni antaŭvidas ke la tuta teksto estos tradukata kaj preta por revizio en la printempo de 1996.

AR

Novaĵoj pri Internacia Tradukreto (ITRE)

Al la listo de tradukantoj aldoniĝis jenaj nomoj (inter krampoj: denaska lingvo):

- Jozsef Nemeth, Kilian LTP.75/9, H-8500 PAPA, Hungario (hungara)
- Ĥristo Dimitrov, Str.Stracin-16, BG-7300 KUBRAT, Bulgario (bulgara)
- Marek Warmuz, ul. Komandosow 7-83, PL-30334 KRAKOV, Pollando (pola)
- J. Claude Thumerelle, rue Pierre Desimpel 10, B-7784 WARNETON, Belgio (franca)
- Attila Bolcskei, Flóra u.10, H-2045 TOROKBALINT, Hungario (hungara)

Momente 12 ITRE-anoj ankaŭ estas IKEF-anoj (pasintjare 7). La dua eldono de la ITRE-adresaro estas daŭre havebla ĉe la kunordiganto: S-ro Daniel DURAND, Les Nids, F-49190 ST-AUBIN-De-LUIGNE, Francio. Prezo: 120 BEF al konto "itre-g" ĉe Flandra E-Ligo aŭ 20 FRF al la kunordiganto.

RR

Reviziado de Plena Ilustrita Vortaro (PIV)

Skipo de reviziantoj nun sin okupas pri nova eldono de PIV. IKEF ricevis peton por kunlabori por la fakoj Ekonomiko, Financo kaj Komerco. Kandidatecoj anoncu sin ĉe s-ro YAMASAKI Seikô.

Krome ankoraŭ mankas reviziantoj por jenaj fakoj:

Anatomio, aviado, aŭtomobiloj, elektro, elektrotekniko, farmacio, fotografio/optiko, geodezio/topografio, hortikulturo, katolikismo, kinoarto, konstrutekniko, kristanismo, maraferoj, maŝinoj/meĥaniko, materialismo historia, medicino, meteologio, militaferoj, radiofonio, religioj ne kristanaj, sciencoj, sporto/ludoj, teknikoj (eksklude de komputiko), telekomunikoj, tipografarto/libroj (ne perkomputilaj flankoj), trafiko, ŝipkonstruado/navigado.

Kompetentuloj estas bonvenaj ĉe s-ro Claude ROUX, p.a. Institut Méditerranéen d'Ecologie et de paléocologie (b. 461), Faculté des sciences et techniques de Saint-Jérôme, rue Henri Poincaré, F-13397 MARSEILLE Cedex

20, Francio; fakso 91.28.80.51 aŭ 91.28.80.30; retpoŝto dettori(a)matop.u-3mrs.fr.

RR

Komercaj petoj kaj proponoj

Ĉinio

Resaniga magneta bendo kontraŭ ostosprono, surbaze de moderna scienco kaj tradiciaj Ĉinaj popolmedikamentoj. Serĉas kunlaboranton por vastigi produktskalon: S-ro Gao Chongcai, 14-34 hao, Piaotun jie, Wuanghua-qu, CN-113001 FUSHUN, LIAONING; tel. oficeje 6681413 kaj 7687023, hejme 2332167.

La Ĉina peranto de IKEF, WANG Tianyi, regule eldonas la Esperanto-Ĉinlingvan informilon monatan BULTENO DE ESPERANTA KOMERCO (BEK), kiun uzas ĉ. 350 geesperantistoj tra Ĉinio, kelkaj E-komercistoj en Japanio, Koreio, Hongkongo, Tajvano, Malezio... BEK ĉiam bonvenigas kaj senpage aperigas viajn ofertojn kaj ideojn. Adreso je p. 2. Fakso +86-29-721.80.42. Telefono +86-29-321.21.71.

WANG Tianyi ofertas

- materialojn por industrioj medikamenta kaj kemia, ekzemple:
ACETYLSALICILIC ACID BP93 - 25 kg/barelo - 3 USD/kg CIF Eŭropo
PARACETAMOL BP88 - 25 kg/barelo - 3.78 USD/kg CIF Eŭropo
CAFFEIN ANHIDROIS BP88 - 25 kg/barelo - 9.3 USD/kg CIF Eŭropo
- diversajn Ĉinajn varojn:
kotonfadena laborganto 45 g/paro - 0.2 USD/paro FOB
diversaj seruroj, ekz. neceseja premseruro - 0.7 USD/unuo FOB
aŭtomata senŝeligilo de pomo - 1 USD/unuo FOB
plasta somerŝuo 0.43 USD/paro FOB
uniformoj armea, laborista, hospitala... 5 USD/unuo FOB

Labori en Ĉinio:

* Anhui Internacia Konsulta Kompanio PACO estas preta peri por geesperantistoj en aliaj landoj. S-ro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230051 HEFEI, Anhui, fakso +86-551-2610570.

* Urbo Xinxiang norde de la flava rivero deziras dungi rusajn servistojn pere de E. S-ro Han Daozhu (prez. de E. Asocio), 755 Chang Zhongxue, CN-453069 XINGXIANG, Henan Prov.

Ĉinaj geesperantistoj serĉas laboron eksterlande. Kontakto s-ron Ĉielismo Von, Xi'an E-Asocio, Xiyinglu 74, CN-710054 XI'AN, fakso +86-29-7218042.

(laŭ Eventoj 91)

Nederlando

Tradukprogramon al 39 lingvoj "Athena" (por Windows-komputiloj) printempe

de 1996 publikigos Gerard van Wilgen, Nederlando. Ideoj pri distribua metodo aŭ informpetoj bonvenas ĉe la aŭtoro, retadreso Gvwilgen(a)worldaccess.nl.

(laŭ Eventoj 91)

Ruslando

Aŭtomata traduksistemo "PROTON-S" (angla-rusa) jam ekzistas. Eblas ellabori variantojn: angla-esperanta kaj esperanta-rusa. Bezonata labor-tempo: 2 monatoj, sed necesas trovi sponsoron kiu antaŭpagas 50%. Prezo angla-esperanta: 1.500 USD, esperanta-rusa: 200 USD. Sponsoro ricevos disketojn kaj rajtos libere vendi kopiojn. N.N. Mihailenko, a/ja 110, R U S - 1 0 9 2 8 0 M O S K V O , r e t p o ŝ t o Nick_Mikhailenko(a)p12.f135.n5020.z2.gate.phantom.msk.su, tel. +7-095-2745075.

(laŭ Eventoj 89)

Tanzanio

Proponas al nutraĵfirmoj freŝajn tropikajn fruktojn kaj legomojn: i.a. ananasoj, citronoj, tomatoj, oranĝoj, kafo, teo, fiŝo... S-ro Epa Ngirum B., c/o A. Tothman Peggy, Box 1848, Mwanzo, Tanzanio.

Nova aliĝo

214. Inĝ. Zdeněk POLÁK, CZ-561 25 RUDOLTICE 95, Ĉeĥio

Lingvo kaj komerco en Ĉinio

En Ĉinio estas diversaj dialektoj kaj inter multaj ne eblas komuniko. Feliĉe ekzistas Pu Ton Hŭa (populara lingvo) per kiu ĉiuj, ankaŭ tibetanoj, mongoloj, viguroj... povas interkomunikiĝi. Fakte, ĝi funkcias por 1.3 miliardoj da ĉinoj kiel Esperanto, sed oni ne lernas ĝin por komerci, same kiel eŭropanoj ne por tio lernas Esperanton. Hongkongo, Tajvano, Singapuro estas pure ĉinaj sen lingva baro. Multaj landoj ĉirkaŭ Ĉinio (Japanio, Koreio...) konas la ĉinan skriblingvon, do problemoj ne estas grandaj kaj ne utilas Esperanto por tiu regiono. Tio signifas ke la E-praktikado en komerco okazu ĉefe inter Eŭropo kaj Ĉinio. Pro tio la ofertoj el La Merkato estas gravaj por ĉinoj, ĉar la ĉinoj bezonas ilin por komerci esperante. Fakte estas bezonataj ankoraŭ multe pli da ofertoj el Okcidento ol nun aperas en La Merkato.

WANG Tianyi

Fabrikado de pasaĝeraj aviadiloj en Ĉinio

Antaŭ nelonge la Ŝanhaja Aviadindustria Kompanio anoncis ke la municipo Ŝanhajo - plej granda bazo pri scienc-esplorado kaj produktado de civilaj aviadiloj en Ĉinio - intencas mem desegni kaj fabriki civiliajn pasaĝeraviadilojn grand- kaj malgrandtipajn.

Li Wanxin, ĉefdirektoro de la kompanio, diris ke en unua fazo la kompanio kune kun aviadilaj kompanioj ĉe la urboj Xi'an, Sheng-yang kaj Chengdu portos sur sin produktadon de 20 aviadiloj de tipo MD 90-30. En dua fazo, post akiro de scio-raĵo kaj kunlaborante kun Usono kaj Koreio, ĝi

produktos aviadilojn kun 100 sidlokoj; tiaj aviadiloj flugu fine de la jarcento. Tria paŝo estos, ĝis la jaro 2010, mem fabriki grandtipan Ĉinan pasaĝeraviadilon. Mu Binghua

